

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Aŭgusto 2022

54-a jaro

N-ro 190

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaŭ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen

Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste

James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP



Nove eltrovita: Esperanto
sur kroata poŝtmarko!

... kaj tiu ĉi ekzemplero
estas via!

KARAJ GELIGANOJ!

La aŭgusta ekzemplero de LVL plenigas nin, la tri redaktantojn, je prava aŭ malprava (dependas de la vidpunktoj!) fiereco. Kial? Kompreneble ĉar ni sukcesis ĝin prezenti al vi belaspekta, enhavinteresa, surprizoriĉa! La fakto estas, ke neniam ni ricevas iun, eĉ etan, aprobvorton pri la LVL-enhavo, tial ni ne scias, ĉu ĝi renkontas vian aprobon aŭ ne. Proverbo tamen diras: *'silento estas konsento'*, do ni daŭrigas laŭ la komencita vojo, kun espero ke ankaŭ ĉi-foje ni trafis nian celon: vian planan kontentiĝon!

La kovrilo estas iom neordinara, ĉu ne? Bela bildo de oficiala poŝtmarko plus ĝia originalo! Ĝi estis trovita de ELF-AREK-ano Michel Basso, antaŭ ĉ. unu jaro, sed prie li informis nur antaŭ kelkaj semajnoj.

Ĉi-tie ĝia priskribo.

Lando	Kroatio
Serio	Festo de sankta Valentino
Eldondato	4 februaro 2015
Temoj	Koroj / sankta Valentino
Koloroj	Nuancoj de nigro kaj violo
Desegnisto	Ivona Đogić Đurić
Formato	48,28 x 40,54 mm
Nominalo	6,50 kunaĵoj
Eldonkvanto	100 000
Teksto	Plurlingva
Katalognumeroj	Mi: HR 1161; Yt: HR 1073; Cro: HR 983

Tre interesa, ĉu ne? Sed kial tiu aldono de la originala poŝtmarko? Tutsimle temas pri decido de via aŭtokrata prezidanto, kiu, konsiderante ke ĉi-jare ni festas la 55-an fondodatrevenon de ELF-AREK (pri tio ĉi atestas la

ENHAVO	
Elda DOERFLER - <i>Vortoj de via prezidanto</i>	2
Elda DOERFLER - <i>Ne tiom konata, sed ... kia esperantisto!</i>	5
Albert BOON - <i>Zamenhofa miniaturo mezotinta</i>	9
Michel BASSO - <i>Iama membro de esperantista asocio iĝis Sanktulo!</i>	11
James REZENDE PITON - <i>Esperanto tra cenzuro (3^a parto)</i>	14
Elda DOERFLER - <i>El Odeso: malnovega poŝtkarto!</i>	21
Elda DOERFLER - <i>Ekologia glumarko el 1931</i>	24

Espereble vi trovos la AMO-Konkurson partopreninda, tial mi atendas senpacience la koncernajn respondojn. La adresoj, al kiuj ilin sendi, estas sur la dua kovril-paĝo.

Pere de nia retejo, www.kolektado.esperanto.cc, alvenis peto de membrigo fare de Andrea Maestri, filatelisto kaj ĵus bakita esperantisto. Koran bonvenon al li! Li loĝas en *via Nello Ponzi, 7 - Lesignano de' Bagni - PR* Italio; lia ret-adreso estas maestri_a@yahoo.it. Liaj temoj estas: pm-oj pri bazopilko kaj Esperantaj poŝtmarkoj kaj bildkartoj. Pri ĉi lasta temo li estas komencanto, tial li sopiregas je via bonvola helpo por pliriĝigi ambaŭajn kolektojn. Aldonindas, ke TUJ li pagis la membrokotizon por 2022.

Tutintence tion ĉi mi aldonas, por atentigi, ke pluraj el vi ne estis ankoraŭ pagintaj la jarkotizon, kaj jam estas for la aŭgusta monato, do pasis pli ol duona jaro! Memorendas, ke, sen tiu via eta kontribuo, estas malfacile pagi la UEA-membrecon, kiel Kunlaboranta Fakasocio, kaj la elspezojn por eldonado de LVL: la presadaj kaj elsendaj kostoj daŭre kaj konstante pliiĝas, plurfoje eĉ dum sama jaro, kiel ekz. en la nuna.

Sed nun ni parolu pri agado. Ĉi-jare ne eblis al mi partopreni en la Montreala UK-o, tial en neniun aranĝo ĉeesta ELF-AREK povis sin prezenti, sed bonŝance, tute senpage, eblas ĝia diskonigo pere de virtualaj renkontoj. Fakte je la 20^a de aŭgusto nia Ligo videblis ĉe la IKUE-kongreso, dum kiu okazis prezentado kun jena temo: *Katolika agado per fotoj, poŝtkartoj kaj glumarkoj*. Spektis ĝin deko da personoj.

Bonvolu noti, ke:

* Dimanĉon, la 18^{an} de septembro, je la 8^a horo matene (por Italio; 16^a horo en Sidnejo) okazos: *Esperanto-Ligo Filatelista sin prezentas*, en Aŭstralio.

* Dimanĉon, la 9^{an} de oktobro, je la 14^a horo (12^a h. UTC) okazos ELF-AREK-a KUNVENO, unuafoje en la ekzisto de nia Ligo!!! Mi ĝojegas, anonci al vi ĉiuj ĉi novaĵon. Mi varme, varmege petegas vin partopreni en ĉi retkunveno. Notu ĝin en via kalendaro. Dankon!

* De vendredo la 28^a, ĝis dimanĉo la 30^a de oktobro 2022, estas planita **AMO-SEMINARIO 94**, organizota, ĉeeste (en Triesto) kaj virtuale, de ELF-AREK kunlabore kun Triesta Eo-Asocio kaj Marija Beloŝeviĉ, *Amo-Seminaria komisionano*. La temo estos *Arkivado kaj kolektado de Esperantaĵoj*. Krom diversaj prezentaĵoj el Aŭstrio, Brazilo, Italio, Kroatio, Slovakio... estos tempo ankaŭ por kundiskutado pri la diversaj ebloj sukcese savi historian materialon priesperantan el rubujoj aŭ el la faŭkoj de la retaŭkcioj. Mi rekomendas vin klopodi ĉeesti ĉi gravan eventon.

Ĉiajn detalojn vi ricevos ĝustatempe pere de retpoŝto.

Via Elda

NE TIOM KONATA, SED... KIA ESPERANTISTO!

Elda DOERFLER

Kiam, foje, oni demandas min, kiu estas la specifa temo pri mia kolektado, la respondo kutime estas: Esperantaĵoj. Sed kion reale signifas tiu vorto?


Ni vidu, kion diras PIV: *io, kio rilatas al Esperanto aŭ karakterizas Esperanton*. Do, io ajn kio estas ŝmirita per verdo aŭ sur kio aperas ĉapelitaj literoj. Ĝenerale E-kolektanto komencas per poŝtmarkoj, interesiĝas poste pri stampoj kaj aliaj filatelaĵoj; renkontiĝas kun insignoj kaj medaloj, daŭrigas per arigado de ĉiuspecaj glumarkoj; malkovras la ekziston de bild/poŝt/kartoj; kaj fine postkuras la signaturojn de pli aŭ malpli famaj esperantistoj. Jen kial ofte aperas en LVL la rubriko **SIGNATUROJ**, kiun espereble vi aprezas kaj al kiu vi ŝatus kontribui per artikolo pri iu interesa samideano, kies subskribon vi posedas.



Ĉi-foje vi konatiĝos kun grafo Albert Gallois, kies agado estas atentinda, precipe ĉar grave li kontribuis al la komenco kaj disvolviĝado de la E-movado en Italio.

En 1853 li naskiĝas en Bayeux, Provenco, kaj mortas en Draguignan, Francio, 1939¹⁾. En 1890 de sia

lando li migras al Riolutato, province de Modena, Italio, kie intense kaj aktive li ekpartoprenas en la loka vivo. En tiu vilaĝo li fariĝas aŭtentika motoro en la kampo soci-kultura, kunfondante i.a. la Akademion *La Scoltenna*²⁾, kies aprezata sekretario li estis de 1904 ĝis 1911, donante sian valoran kontribuon al ĝia bona funkciado favore de la lokanoj. Li sukcesas porti al Riolutato turistojn el pluraj partoj de Italio, skribas kaj mem eldonas la *Gvidlibron de l' turistoj* (1904) kun frazareto en esperanta kaj itala lingvoj; fondas, verkas kaj eldonas por la samurbetanoj la ĵurnalon *L'Eco dei Monti* [Eĥo de l' Montoj], ĉiam strebante plivigligi la vivon en tiu loko eta, sed mergita en belegajn naturajn pejzaĝojn. En Riolutato li edziĝas kun Luisa Rasponi, loka junulino.



Profesie li estas fakulo pri konstruado de fervojaj retoj, tial multe li vojaĝas, i.a. al Tunizio, Kanado kaj franca Gvineo. Pri lia vojaĝo al tiu afrika lando klare atestas la apuda poŝtkarto. En ĝi fakte li parolas pri sia baldaŭa foriro al la franca Gvineo, pli precize al ĝia ĵus fariĝinta ĉefurbo Konakry (1904), kiu danke al la konstruado de fervoja reto en la postaj jaroj treege prosperos. La pk-o estas sendita la 26^{an} de majo al s-ro Charles Brunet, alia elstara franca esperantisto, kun kiu estus ege interese konatiĝi.

Sed ni revenu al lia esperantistiĝo, okazinta en 1902. Aŭtodidakte li lernas la lingvon. Oni devas ekscii, ke en Italio la unua pioniro estis Daniele Marignoni, kiu verkis la unuan italan gramatikon de Esperanto jam en 1890, kiu tamen ne akiras multe da sukceso en siaj

GRAFO ALBERT GALLOIS
 Ĝenerala-Sekretario de l'I. S. p. p. E.
 Ĉefredaktoro de "L' ESPERANTISTA"
 Riolunato "Modena" Italujo

26 MAI 1904

Kara Kolego,

Mi nenion ricevis de vi, sed, plezure, mi trovas al vi la kvin ekzemplerojn de la ĵurnalo. Baldaŭ mi foriros Parizon, tiam mi vidos vin. Amikties pri via abono. Eble, mi venos Pordoson, kiam mi foriros Konakry'n en la franca Gvineo. Tiam mi haltos en via urbo, mi tre agnoski vian kaj aliajn Esperantistojn. Se vi bezonus ian aferon, skribu rekte al mi, ĉiam mi faros tion, kion mi povos por plenumi vian peton.


Estu bona via Grato Albert Gallois



7-a de marto 1904 - Grafo Albert Gallois skribas de Pievepelago, vilaĝo distanca de Riolunato nur 4 km-ojn, al advokato H. Voituret, Francio.

klopodoj ĝin disvastigi. Ĉefa kialo de tio estas - laŭ lia konfeso mem - *tempomanko kaj iaj miaj cirkonstancoj kiuj malpermesas al mi propagandi tiun ĉi lingvon.*

Male, Albert Gallois, post la ellerno de la lingvo, tuj aktiviĝas, tradukante al la itala *Esperanto en dek lecionoj*, gramatikon aŭtoritan de la franca akademiano Th. Cart kaj de M. Pagnier. Lanĉinte intensan propagandon, li fondas junio 1902 en Riolutato la Grupon Esperantistan *Ĉiam antaŭen*, kiun sekvas en oktobro la naskiĝo de la *Itala Societo por la Propagando de Esperanto*, kies provizora komitato konsistas el la jenaj pioniroj: d-ro Giovanni Cacciapuoti, kuracisto, el Napolo - *prezidanto*; la angla Clarence




Clarence BICKNELL,
Bordighera

Bicknell, el Bordighera - *vicprezidanto*; d-ro Umberto Ceretti, direktoro de la Reĝa teknika Lernejo, el Pordenone - *vicprezidanto*; grafo Alberto Gallois, el Riolutato - *ĝenerala sekretario*; Teodoro Benassi, *vicsekretario* plus dek du aliaj konsilantoj. Ene de tri monatoj fondiĝas aliaj societoj aŭ grupoj tra Italio, kiel konstateblas legante la nomojn de la komitatanoj. La *Itala Societo* kompreneble havas sian sidejon en Riolutato. Aperas ankaŭ la unua itala E-revuo *L'Esperantista*, en Torino,

kie s-ro Germano jam starigis grupon. La 25^{an} de aŭgusto 1902, A. Gallois bedaŭre skribas en ĝi pri la indiferteco de la italoj rilate al Esperanto: "... nur 50 ĝis 60 homoj komencis lerni ĝin, ĉefe en Romo".


En 1904 li eldonas alian turisman libreton *Italujo bela*, kiu entenas priskribojn pri kelkaj italaj urboj, kaj alian tradukon: ĉi-foje temas pri *Unuakta salona komedio: DEKTROPE!* Ne konatas la aŭtoro!

Por la plej multaj el siaj samtempuloj kaj najbaroj, Gallois estas iom originala kaj ekstravaganca, sed verdire ankaŭ tre progresema, entuziasma kaj simpatia. Imagu kion li elpensas en 1903! Li ekhavas la brilan ideon organizi en Riolutato internacian kongreson, du jarojn antaŭ la UK en Bulonjo-ĉe-Marŝo! Li invitas la ĉefan Esperantiston de la tuta mondo, d-ron Zamenhof, kiu dankresponde certigas pri la alveno de iu sia reprezentanto. Legendo aŭ vera historio (kiu scias!) rakontas, ke tiu rusa delegito vagadas longatempe, antaŭ ol sukcesi atingi tiun etan vilaĝon, kie tamen finfine li




estas akceptita varmkore kaj entuziasme. Post la solenaĵoj de la unua kongrestago, dum kiuj laŭvice la ruso, la franco kaj italo prezidas ĉepodie laŭdante la mirindajn avantaĝojn de internacia lingvo, je la sunsubiro “oni vidis ilin brakenbrake trairi tien kaj ĉi tien tra la vilaĝaj stratetoj, himnante al la plej rimarkinda sukceso de internacia lingvo Esperanto”³⁾.

Tre diverstalentaj, li estas ankaŭ aprezata fotisto: en Riolutato li malfermas fotografan laborejon. Multe li ŝatas foti pezaĝojn de la teritorio monta ĉirkaŭanta Riolutato-n, speciale la ŝtonajn pontojn, aŭ scenojn familiajn kaj laboristajn.



1909 Laboristoj de la Ponto Luna



Konklude, aŭtentika vulkano de ideoj, iniciatema, entreprenema, kaj certe sincere homama, atenta al bezonoj de la aliuloj, plene konvinkita pri la futura realiĝo de tiuj grandaj idealoj enestantaj en la interfratiga ilo kia estas Esperanto, al kiu li fervore dediĉis granda parton de sia tuta vivo.

1) Ndr: en Vikipedio, “Pioniroj de Esperanto en Italio” de Elio Migliorini: tie la mortojaro estas indikita kiel 1937; aliloke 1936. En “L’Esperanto in Emilia-Romagna”, verko de Luigi Tadolini, aperas la jaro 1939^a.

2) Skoltenma: la titolo de la asocio devenas de la rivera nomo trairanta la vilaĝon. Nuntempe ĝi okupiĝas pri antaŭenpuŝo de teritoriaj kulturoj kaj artoj.

3) El “L’Esperanto in Emilia-Romagna”, verko de Luigi Tadolini.

Fontoj:

Migliorini Elio. *Pionieri dell’Esperanto in Italia* [Esperanto-Pioniroj en Italio]. Roma 1982 (en la itala); 32 pĝ.

Tadolini Luigi. *L’Esperanto in Emilia-Romagna* [Esperanto en Emiljo-Romanjo]; Cerer 1989 (en la itala); 182 pĝ.

Sarandrea Carlo. *Origini del movimento esperantista a Roma (1905-1935)*. [Originoj de E-movado en Romo.(1905-1935)]. Roma E-Centro 2005; 58 pĝ.

ZAMENHOFA MINIATURO MEZOTINTA

Albert BOON

La ĉi montrata grafika miniaturo el 1986, kreita de Zoltán Bagarus, povus esti skizo por unu el la multaj ekslibrisoj kiujn kreis tiu hungardevena artisto. Tamen, provizore ni ankoraŭ ne trovis ekslibrison kun la samaj bildo kaj temo. Mankas do la kutima surskribo “Ex Libris” (ekslibriso) kaj la nomo de la komisiinto. Ĝi aperis en nur 20 subsignitaj ekzempleroj en tre malordinara stilo, laŭ la tekniko de la nun eksmoda, renesanca “mezotinto”.




Tiu tekniko, nomata “mezotinto” (=mez-kolornuanco), ofte france nomata “manière noire” (=nigra maniero), aŭ “angla bildo”, estas nuntempe malofte aplikata stilo. La bazo estas nigra (en nia ekzemplero eĉ malhelbruna) ebenaĵo, en kiu pere de diversaj instrumentoj estas vidbligataj diversaj grizaj kolorregistroj.

La germana gravuristo Ludwig von Siegen (1609-1680) eksperimentis, amase trapikante platon per kudrilo. La rezulto estis kromeĝa surfaco. Post prempatigado de la kromeĝoj, tiuj lastaj tenis malpli da inko kaj tiel post la depresado aspektis pli grizaj ol la malhela fono. Glatpolurita plato (ebla, sekvanta fazo) tute ne plu tenis inkon kaj aspektis tial blanka. En Britio tiu metodo estis ofte uzata, i.a. por reprodukti pentraĵojn. Tamen, je la fino de la 19^a jarcento la tekniko fariĝis ekskutima.



La miniaturo mezuras 144 x 107 mm-ojn kaj montras buston de Zamenhof en ajurita babel-turo. Sub la bildo estas la subsigno de la aŭtoro. La surskribo estas hungara kaj esperantigita signifas: “1859-1917 Dr. LUDWIG LAZAR ZAMENHOF, la lingvo de la espero, kreanto de Esperanto” 1887 VII 17”. La eldonkvanto estas evidente tre modera pro la rapida eluziĝo de la kromeĝoj. Por nia Zamenhofa miniaturo la eldonkvanto estis nur 20 ekzempleroj. La montrita depresado ricevis la numeron 10/20.

La artisto, Zoltán Bagarus (1947-1999) estis fervoja inĝeniero kaj grafikisto. Li finstudis en 1965 en Budapeŝto ĉe la Teknika Lernejo pri fervoja tekniko



kaj establis sin en Ajka kiel lokomotivŝoforo de la “Ajka Aluminfabriko” kaj kiel aluminfandisto. Post grava malsano li estis redungita en 1974 kaj daŭrigis labori kiel meritulo-teknikista desegnisto.

Ekde 1980 li studis grafikon kaj lernis krei akvaĵojn kaj litografajojn ĉe la profesia mentoro Imre Kéri. En la sama jaro li iĝis unu el la fondintoj de la Ajka-grupo “Rondo de Etgrafikistaj Amikoj”, en 1982 de la “Ajka Grafika Metiejo”. Li partoprenis multajn en- kaj ekster-landajn prigrafikajn konkursojn kaj ekspoziciojn. Unuopule li eksponis en 1989 en Keszthely, en 1993 en Ajka, en 1995 en Pápa. En 1987 li ricevis individuan distingon en Kecskemét. Bagarus estas konsiderata kiel majstro de eklibrisoj.



IAMA MEMBRO DE ESPERANTISTA ASOCIO ĜIS SANKTULO!

Michel BASSO

La 3^{an} de novembro 1985 Papo Johano Paŭlo la Dua proklamis beata patron Tito Brandsma, pereintan en la germana koncentrejo Dachau kaj ĉi-jare je la 15^a de majo 2022, la Katolika Eklezio kanonizis lin, kiel martiro. Do tiu esperantisto iĝis sanktulo.

Titus Brandsma, en Esperanto *Tito Brandsma*, naskiĝis la 23^{an} de februaro 1881 en Oegeklooster apud Bolsward, Nederlando, kaj mortis la 26^{an} de julio 1942 en la koncentrejo de Dachau pro siaj kontraŭnaziaj agadoj. Li estis romkatolika pastro, membro de monaĥa Karmelana ordeno, profesoro pri filozofio, ĵurnalisto, verkisto, tradukisto, martiro kaj esperantisto.

Je sia naskiĝo, li ricevis la nomon Anno Sjoerd sed post aliĝo al la Karmelana ordeno, li alprenis la nomon Titus (Tito), pro amo kaj respekto al sia patro.

En 1905 li estis ordinita pastro. Post tio ĉi, li studis en Romo kaj en 1909 ricevis la filozofian doktoriĝon. Reveninte al sia patrujo, li ekinstruis ĝin en kelkaj edukaj institucioj. Brandsma okupiĝis pri studado de la karmelana mistikismo kaj unu el liaj plej grandaj meritoj estis la traduko al la nederlanda lingvo de la verkoj de Sankta Tereza el Avila.

Titus Brandsma iĝis en 1923 unu el la fondintoj de la unua Katolika Universitato en Nederlando (en Nijmegen). Tie li instruis filozofion kaj historion de mistikismo. Poste li iĝis rektoro de tiu universitato. Li ankaŭ faris multe da ĵurnalisma laboro, kunlaboris kun dekoj da katolikaj eldonaĵoj en Nederlando kaj aliaj Eŭropaj landoj.

Jam antaŭ la nazia invado de Nederlando en 1940, Brandsma aŭdace esprimis reziston kontraŭ la nazia ideologio. Li alvokis la katolikan gazetaron de la lando ne fari nazian propagandon. En publikaj paroladoj li emfazis la nekongruon de naziismo kun la katolika kredo kaj protestis kontraŭ la persekutado de judoj.


En januaro 1942, Brandsma estis arestita. Post mallonga restado en pluraj nederlandaj tendaroj por kaptitoj, li estis translokita al Dachau. La 26^{an} de



julio 1942, Titus Brandsma estis mortigita per pereiga injekto. La koncentretra flegistino, kiu ekzekutis lin, poste pentis kaj atestis ĉe lia beatigo.

ESPERANTA VIVO

Titus Brandsma estis esperantisto ekde 1911. En malnovaj jarlibroj de IKUE (ekzemple de 1926 ĝis 1932) aperis liaj nomo kaj adreso. Brandsma pioniris en la organizado kaj direktado de la katolika verkistaro kaj Eku-mena Movado: en tiuj aktivadoj li uzis ankaŭ Esperanton. Okaze de la 4^a jarkunveno de *Nederlanda Katolika* (organo de Nederlanda Katolika Esperantista Ligo), en 1913 en s'-Hertogenbosch celebris la meson por la vivantaj kaj mortintaj membroj. Li estis unu el la organizantoj de la Kongre-



so de Nederlanda Katolika (s'-Hertogenbosch, 1934), membro de honora komitato kaj ankaŭ inter la partoprenantoj de la 19^a IKUE kongreso (1937, Hago).

La Internacia Asocio de Katolikaj Esperantistoj - IKUE faris de Titus Brandsma unu el siaj patronoj.

MEMORLOKOJ KAJ MONUMENTOJ

- * Muzeo Titus Brandsma en urbo Bolsward (NL).
- * La nederlandaj publikaj transportkompanioj *Veolia* kaj *Arriva* titolis trajnotipon laŭ lia nomo.
- * En multaj urboj, Nederlande kaj eksterlande (Francio, Germanio, Irlando, Pollando), lernejoj, preĝejoj kaj stratoj ricevis lian nomon. La *Titus Brandsma Memorial* en Nimego posedas murpanelojn, dezajnitajn de ar-

tistoj, prezentantajn liajn vivon kaj spiritan vojon.

* Je lia rememoro estis starigita *Titus Brandsma Instituto* ĉe la Universitato de Nimego, kiu, ekde 1993, organizas ĉiujare prelegojn pri akademia esplorado de historio kaj signifo de juda kaj kristana mistikismoj, kaj similaj temoj.

* En Francio ekzistas internacia ĵurnalista premio kiu portas lian nomon, *Prix Titus Brandsma*, aljuĝita ĉiun trian jaron al ĵurnalisto, publikaĵo aŭ institucio, kiu estis atakita per minacoj aŭ persekutadoj, sekve de sia engaĝiĝo en gazetaro favore al gravaj homa aŭ kristana temoj.

* En 2005, T. Brandsma estis elektita, de la loĝantaro de Nimego, kiel la plej eminenta loĝanto en la urba historio.

KAJ KIO PRI FILATELO?

En 2002 Nederlando eldonis seriojn da poŝtmarkoj pri siaj provincoj, inter ili estas provinco GELDERLANDO, kun la simboloj de tiu regiono (Titus Brandsma; Kastoroj; Montoj Posbank de Parko Veluwe; Flipje, la fruktohomino de Tiel; Gelderlanda fumaĵita kolbaso; Vierdagse, internacia kvartaga marŝado de Nimego.)

Do ekzistas almenaŭ unu objekto por nia temo!

La kompleta folio konsistas el 12 poŝtmarkoj, la unua talono supre estas dediĉita al Titus Brandsma.

Eldondato: 23/04/2002

Formato: 36x25 mm

Valuto: 0.39 €;

Dentumo: 14:14

Papero: Normala per fosfora presado

Gumo: sinteza

Presa tekniko: ofseto

Eldonkvanto: 100 000 folietoj = 1 200 000 PM = 100 000 talonoj de Titus B.

Aŭtoro: Vandejong, Amsterdam

Presejo: The House of Questa - Britio
Nederlanda skribaĵo en la talono: La beatigita rezistheroo mortis en Dachau.

Gelderland: provinco de Nederlando.



ESPERANTO TRA CENZURO (3A PARTO, SED NE LA LASTA)

James REZENDE PITON

Finiĝis la enlanda milito en Hispanio, pritraktita en la antaŭa numero de *La Verda Lupeo*, sed kiel sekvo de tiu konflikto post la venko de Francisko Franko, la ŝtata organo pri sekureco (DGS) gajnis pli da forto kaj respondecujoj. Cenzurado plu okazis, sub ĝia zorgo por civilaj korespondadoj. Tio tamen ne baris la korespondadon inter hispanoj kaj alilandanoj.



Poŝtkarto tajpita en Esperanto kaj sendita la 2.2.1941 el Figueras (Hispanio) al Visby (Svedio). Stampo de cenzuro farita de la Ĝenerala Direkcio de Sekureco (DGS), organo de la registaro de Francisko Franko. (Kolekto de la aŭtoro)

Ni tamen retroiru du jarojn, kiam la invado de Pollando fare de Germanio la 1^{an} de Septembro 1939 startigis la Duan mondmiliton, la “totalan militon”, por uzi esprimon kreitan de la germana generalo Ludendorff en 1935. Cent milionoj da militistoj estis mobilizitaj, inter 50 kaj 70 milionoj da mortintoj post preskaŭ sesjara batalado ĉefe en Eŭropo, sed ankaŭ en la nordo de Afriko, Mezoriento, sudorienta Azio, Ĉinio, Japanio kaj ankaŭ surmare, en la Atlantiko kaj Pacifiko.

Oni konis la plej terurajn krimojn en la traktado kaj mortigo de civiluloj en diversaj lokoj. Unu el la plej gravaj libroj de la esperanta literaturo, *La Danĝera Lingvo* (Ulrich Lins), aperinta ankaŭ en la germana, rusa, litova, angla kaj itala, montras apartajn persekutojn, kiujn spertis esperantistoj.

En tiel granda konflikto ne povis foresti la okazoj de poŝta cenzuro.

Post nur 6 monatoj de la milito, la nazia reĝimo faris dekreton por reguligi la komunikadon, la 2^{an} de Aprilo 1940. Ĝi estis detalita per preskriboj en la 12^a de Majo, kiuj aperis en la oficiala gazeto, *Reichsgesetzblatt*, n-ro 95, de la 1^a de Junio 1940, pĝ. 823.



§ 2

(Zu Abschnitt II der Verordnung)

Der Post- und Fernmeldeverkehr mit dem nichtfeindlichen Ausland ist auf das Äußerste einzuschränken.

A. Postverkehr

1. Im Postverkehr nach dem nichtfeindlichen Ausland ist verboten:

- a) die Versendung von Ansichtspostkarten aller Art, von aufgetriebenen Photographien, Blindenschriftsendungen, Schachaufgaben, Kreuzwort- und anderen Rätseln,
- b) der Gebrauch von Geheimtinten, Geheimschriften, Kunstsprachen, wie Esperanto und Geheimsprachen (mit Ausnahme der unter Buchst. B Nr. 2 aufgeführten Codes), sowie von hebräischen Schriftzeichen,
- c) die Anwendung von Kurzschriften aller Systeme,
- d) die Benutzung gefütterter Briefumschläge,
- e) das Einwerfen von Briefsendungen in Briefkästen.

Inter aliaj, paragrafo n-ro 2 difinas malpermeson pri la sendado de fotografiaj bildkartoj, korespondaj ŝakludoj, krucvortoj ks.


Je la litero b), aperas la malpermesoj pri mesaĝoj en kodigita lingvo, en **“artefaritaj lingvoj kiel Esperanto kaj sekretaj lingvoj”**, same kiel skribaĵoj en la hebrea alfabeto. Ankaŭ stenografiaj mesaĝoj estis neakceptataj, ĉar tio kompreneble postulus pli da kapablaj cenzuristoj.



Letero resendita al la sendinto. Resendo-stampo, kiu asertas, ke la malpermeso en la livero estas bazita sur la preskriboj de la leĝo pri komunikado el 2.4.1940, aperinta en la oficiala gazeto (Reichsgesetzblatt, I p. 823).



Dorse: fermetikado de censurejo en Frankfurto (identigita pro malgranda litero “e” sub la nazia simbolo) kaj ruĝa stampita linio “Privata presaĵo ne permesata”. (Kolekto de la aŭtoro).

La efektivigo de la leĝo estas videbla ankaŭ sur aliaj poŝtaj stampoj, kiuj resumis la limigojn. Iuj modeloj estas pli simplaj, aliaj menciis ankaŭ Esperanton, kiel la montrita ekzemplero.



Dorsflanko de letero sendita de Berlino, 27.12.1940, al Roterdamo (Nederlando) - fermetikado kaj stampoj indikas, ke la koverto estis malfermita de nazia cenzurejo en Frankfurto (litero "e" sub la nazia simbolo). En la stampita formulo oni krajone skribis, ke estas malpermesate sendi fotopoŝtkarton. Inter la ceteraj kialoj por resendi leteron sub la nazia regado troviĝas en la 5-a linio: "lingvo, artefarita lingvo, Esperanto ktp, ne permesataj". (*Kolekto de la aŭtoro*)

La afero ripetigis en Norvegio, kies registaro sub ĉefministro Quisling facile submetigis al la naziaj planoj. La ruĝaj stampoj de tiu ĉi letero el 30.5.1944 deklaras, ke ĝi estas resendota al la sendinto kaj ke temas pri cenzuro fare de la germanoj.




Karto aerpoŝte sendita de esperantisto en Kindsboda (Svedio), 14.4.1944, al Madrido (Hispanio). Ricevita la 13^{an} de Majo. Ruĝa ronda stampo de la Ĉefkomando de la Germana Armeo, aplikita de cenzurejo en Berlino (literoj “b”). Nigra hispana stampo “Censura Gobernativa - Madrid”, registara cenzuro. (*Kolekto de la aŭtoro*)

Iuj landoj, kiel Britio, Brazilo, Belgio kaj la brita administrado en Palestino, postulis, ke oni deklaru sur la fronto de korespondaĵo, en kiu lingvo la interna mesaĝo estas skribita. Tio faciligis la pritraktadon en la poŝt-oficejoj, kiuj kunigis kaj liveris al militistaj cenzuristoj por analizo de la enhavo.



Letero sendita de Internacia Esperanto-Ligo en Britio al Yvry-sur-Seine (Francio), la 6^{an} de Januaro 1945. Privata stampo “Language ESPERANTO”, poste kovrita per la fermetikedo de brita cenzuristo n-ro 5,014, indikas la lingvon de la enhavo, laŭ la postuloj. (*Kolekto de la aŭtoro*)



Pligrandigita bildo de cenzura stampo sur letero sendita de Jerusalemo al Langnau (Svislando).

Ĝi ricevis la cenzuran fermetikedon en la sendoloko. Surdorse, stampo de la Jerusalema Poŝta Cenzurejo, kiu anglalingve tekstas: “Bonvolu peti la sendinton estonte menciĝi sur la fronto de la koverto la lingvon en kiu la letero estas skribita”. (*kolekto de la aŭtoro*)



La belgaj cenzuristoj tamen ne estis tiel indulgaj. Dulingva stampeto atentigis la sendinton, ke la korespondaĵo ne plu iris pro la manko de lingva deklaro. Resendita!



Letero sendita de Ostendo, Belgio, al Bulonjo (Francio). En la detalo, la dulingva (nederlanda-franca) stampo “Uzita lingvo ne deklarita”, kialo por redono al la sendinto. (*kolekto de la aŭtoro*)

En Brazilo la cenzuro toleris leterojn skribitajn en la portugala, angla, franca, hispana, itala kaj germana, kiel oni povas vidi sur slipo por rifuzita letero, kiel difinite en 1942 (jaro en kiu la lando eniris en la Militon, apud Aliancanoj). Mane skribite estas poste aldonitaj akceptataj lingvoj: pola, araba, nederlanda, rusa, ĉina kaj Esperanto.



Registrita letero sendita de Brazilo en junio, 1945 al neidentigita loko (ĉar cenzura slipo estis algluita), kun fermetikedo kaj cenzuritaj stampetoj en gubernio São Paulo. Resendita pro

lingvo post kontrolo de la brazila cenzuro, kiel videble en interna presita slipeto (bildoj el la artikolo de EISSLER, Roberto J. - "Correspondências censuradas no Brasil durante a 2a. Guerra Mundial", ĉe *A Filatelia Brasileira*, jaro II, n-ro 3, Junio 2005).

DEPARTAMENTO DOS CORREIOS E TELÉGRAFOS

CENSURA POSTAL DO BRASIL

Devolvida ao remetente

Só têm curso no Correio as cartas escritas em português, inglês, francês, espanhol, italiano e alemão, polonês,

árabe, holandês, russo, chinês e esperanto

S. P. 39
CPB-4
(26/10/42)

S. P. 408

Por ne trolongigi tiun ĉi artikolon, ni lasos por kroma parto, en venonta numero, la okazaĵojn de poŝta cenzuro post 1945. La kontrolado en iuj mondopartoj ne havis finon kun la granda milito.

EL ODESŖ: MALNOVEGA POŖTKARTO!

Elda DOERFLER

Kiom da juveloj, **verdkoloraj**, sin kaŝas en la vastega spaco interreta! Kaj kiom da surprizoj, kiom da novaj historioj eblas ekkoni, historioj pri kiuj plej probable tre malmultaj scias.

Dum vagado tiea, altiris mian atenton retejo, neniam antaŭe esplorita: <https://verdalampo-info/>

Propagandi Esperanton hieraŭ kaj hodiaŭ

Pensado ĉe la Verda Lampo

Aĥ, kiaj iam estis la homoj! Kiel ili lernis la lingvon, ili ekreis kaj diskutis pri ĝia disvolvo, kiel propagandi Esperanton!

Gravecon de propagando komprenis ĉiuj, unuavice - Zamenhof mem. En sia unua libro li proponis al la legantoj promesi ellerni Esperanton, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson.

Kia reklama artifiko!!

Unuaj esperantistoj, efike kaj efekte, agis sur la reklama tereno, propagandinte la internacian lingvon. Ankoraŭ komence de 20^a jarcento ili aktive diskutis en sia rondo, eblecon propagandi la lingvon per partoprenado en socio-signifaj aranĝoj en ĉiu urbo, en ĉiu lando. [...]

Kaj jen kiel estis la propaganda agado de la ukrainaj samideanoj, okaze de la Ekspozicio pri Artoj Industriaj en Odeso.

Antaŭanonces ĝin *ESPERANTO* de UEA - 5^a de majo 1910.


Ukrajnaj Ekspozicioj - Inter la kuriozaĵoj: Esperanto-Samovaro

[...] Ekspozicio en Odessa, la plej granda urbo en Ukrainujo, daŭros de la 1-a Junio ĝis la 15-a Novembro. [...] estos aranĝataj specialaj ĉambroj, en kiuj estos montritaj novelpensitaj iloj, instrumentoj, maŝinoj, k.t.p.


Sed la plej rimarkinda vidindaĵo estos la grandegulo-samovaro (te-maŝino), elpensita kaj konstruota de nia kara kunlaboranto S-ro E. Fon-Fjuler¹; alte ĝi estos 22 metroj²; kaj tiu ĉi samovaro estos tute esperanto; ĉiuj surskribaĵoj de ĝi estos skribitaj nur en Esperanto, kaj interne de ĝi estos vendataj ĉiuj esperantaĵoj. Supre de ĝi estos konstruita plateto, sur kiu per pingloj estos vidataj ĉiuj lokoj de terglobo, en kiuj ekzistas esperantistaj societoj, grupoj, delegitoj de U.E.A., k.t.p.; sur la muroj de plateto estos pendataj ĉiuj esperantaj gazetoj, libroj, broŝuroj, katalogoj, poŝtkartoj kaj aliaj esperantaĵoj; [...] sur la muro estos pendata granda portreto de nia kara Majstro d-ro L. Zamenhof, ornamota per belaj esperantistaj flagoj kaj rubandoj [...]

V. Fomenko (Del. Odessa)

Dum la tuta daŭro de la ekspozicio laboris nelacigeble diversaj samideanoj, kiuj disdonadis 6 500 flugfoliojn, krome estis venditaj diversaj esperantaĵoj kun suma enspezo de 170 rubloj. Engaĝitaj en la aranĝado estis s-roj von-Füller kaj Fomenko, kiu interalie prenis sur sin la tutan financon kaj komercan flankon. Jen tiaj estis la esperantistoj!



Arte desegnita, la kolora bildkarto montras parton de la Ekspozicia areo Maldekstre, ruĝacirke, videblas la Pavilono Samovaro - Giganto.



Ĉi-maldekstre ĝia foto: la samovaro estis starigita kiel propagandilo por la teo-fabriko el Moskvo - Московская чайная компания Караван. Fondita en 1893 fare de la germano Philip Maximilian von Wogau en Moskvo, ĝi okupiĝas, ankoraŭ nun, pri produktado kaj vendado de teo. Fakte ĝi estas unu el la plej malnovaj rusaj tekompagnioj. La teo, tre ŝatata de la rusa popolo (ĉ. 73 %!), konsistas el miksaĵo de la hindaj kaj kvartelaj aromfolioj.

‘Surkape’ de la samovaro estis lokita grandega te-kruĉo surhavanta la nomon de la fabriko. Sube de ĝi troviĝas cirkla belvidejo, danke al kiu oni havis 360-gradan vidaĵon de la tuta ekspoziciejo. Tie estis ankaŭ restoracio por la vizitantoj.

Fronte, videblis la E-stelo kaj la skribaĵo SAMOVARO-GIGANTO! Ekzistas ankaŭ tute sama poŝtkarto, kies stelo estis brile kolora, sed tio estas trompeto esperantista, ĉar reale ĝi estis malhele verda (supozeble!)



Vere ĉarma ĉi tiu bildkarto reklamanta la ekspozicion sed precipe la Pavilonon Esperanto. La kartoj ne plu estas troveblaj, eĉ la E-klubo en Odessa ne posedas ilin: granda bedaŭro pro tiu perdo! Korege mi dankas s-inon Tatiana Mykhno, kiu donis al mi la permeson elpreni informojn pri tiu evento el la Odesa retejo, dum por havi kelke da pliaj klarigoj mi mem devis traserĉi, sen tiom grandaj rezultoj, tamen... sufiĉe kontentigaj!



Memorinsigno el arĝento pri la Artindustria ekspozicio en Odeso 1910.

Sur la tekruĉo legeblas la nomo de la moskva fabriko, kiu aperas ankaŭ en la nuntempa reklamo: **КАРАВАН KARAVAN**



Notoj:

1) Aliloke, E. von-Füller (el *Ondo de Esperanto*, aŭgusto 1910); 2) Indikoj pri la mezuroj de la samovara alto estas tre malsamaj: 13 m, 20 m kaj fine 22 m. Mi elektis la plej grandan ciferon! 3) En la tekstoj kursivaj estas kelkaj eraretoj, kiuj tamen ne ĝenas la komprenon, tial mi lasis ilin tiaj, kiaj ili estas en la originalo.



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidantino:

Elda DOERFLER

Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.

Kunredaktantoj: James REZENDE PITON - sudastelaro@gmail.com

Albert BOON, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be

ELF-AREK tt-ejo: www.kolektado.esperanto.cc



EKOLOGIA GLUMARKO

EL 1931

Sendis ĝin nia dana samligano Jan Niemann. Prie li informas, ke ĝi troviĝas sur koverto sendita de Peruo al Svedio, en tiujara novembro. Nuraj scioj estas, ke ĝiaj mezuroj egalas al 46x62mm kaj ke temas pri kolora rastruma presaĵo. Nia amiko Jan aldonas; “Ĝi estas la sola ekzemplo pri E-lingva naturprotektada varbado glumarka, kion mi vidis ĝis nun!” kaj pri tio mi tute konsentas. Ĉu la membroj glumark-kolektantaj povas aldoni aliajn ekzemplerojn ekologitemajn? Estus interese por ni ĉiuj! Mi atendas senpacience belajn surprizojn!

ELDA

